



Enhavo

- Monda Fest' ligas la homojn
- La Tago de Eŭropo
- Du eroj el la programo
- La libro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU)

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-43 sendita el Budapeŝto, la 22an de aŭgustoo

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Monda Fest – La Tago de Eŭropo

La Tago nun progresas, kun salutoj kaj filmoj el mirinda kvanto da landoj de la kontinento. Ni strebos poste porti al vi plurajn el tiuj landaj prezentaĵojn.

La programon malfermis kaj prizorgis Aleks Kadar, la ĝenerala sekretario de UEA, helpe de la teknika helpanto Luis Obando. Tiuj vidigis la francan kantiston Gijom', kiu pianludis kaj kantis, kune kun vidigo de la kantata teksto. Sekvis saluto de Stefan MacGill, nome de la Eŭropa Komisiono, kiu unue gratulis al UEA pro sukceso de la Monda Fest', sekvata de mallonga prezento pri la stato de la Eŭropa movado, kune kun la bezono por generacia rejniĝo kaj la refortigo de la sekcioj de TEJO. Tiu prezento estas alkroĉita, en formato PDF.



Dum mi verkas, la landaj prezentoj jam atingis F laŭ la alfabeto ordo.. Do, alkroĉita estas la prezentaĵo de Francio. Per posta EKO, ni raportos pri la pliaj eroj kaj konkludoj de la Tago.

La uzon de Zoom prizorgis bonege la irana asocio IREA.

IKU-LIBRO 2020: REKORDE ELŜUTITA

Dum la Virtuala Kongreso de Esperanto la unuan fojon IKU-libro estis elŝutebla senpage jam dum la monda kongreso de UEA. La libro, kiu prezentas la tekstojn de la sep prelegoj en la 73-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj resumojn de la kvar prelegoj de la Scienca Kafejo, estis elŝutita pli ol 2000 fojojn dum la kongresa semajno.

La libron redaktis Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko, Amri Wandel kaj provlegis Rob Moerbeek. Eldonis ĝin la eldonejo "Impeto" en Moskvo kun aŭspicio de UEA kaj Akademio Internacia de la sciencoj (AIS). Estas menciinde, ke samtempe UEA malfermis la aliron al la retaj versioj de du antaŭaj IKU-libroj - de 2018 kaj 2019 - ili estas senpage elŝuteblaj en la IKU-paĝo de UEA, uea.org/teko/IKU. Aperos ankaŭ la papera libroforma versio de IKU-tekstaro. Ĉiuj dezirantoj povos poste akiri ĝin en la libroservo de UEA kaj libroservoj de kelkaj Landaj Asocioj.



UEA dankas al la eldonejo "Impeto" kaj al la redaktoroj, kiuj senrekompence laboregis por ebligi la aperon de la IKU-libro.

Vi povas donaci, omaĝe al tiu ĉi eldono, al la Ĝenerala Kaso de la Universala Esperanto-Asocio uea.org/alighoj/donacoj/kaso, kiu nun bezonas vian helpon.

Elŝutu senpage kaj ĝuu: iku.trovu.com

===== vortoj: 370 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.